

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 382</i> <i>aŭg. / 2023</i></p>
<p>Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994</p>		
<p>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm</p>		

Tiberio Madonna (Italio)



Tago de printempo

La floroj
elmontras fiere
siajn vestetojn
multkolorajn;
la folioj
verdigate de l' suno
spegliĝas
en la tapiŝo el herbo densa;
la floketoj
de l' leontodo
flirtas en l' aero
kiel blankaj paraŝutoj;
la suno
radia
kombas en la ĉielo
siajn longajn harojn blondajn
kiuj karesas
la nubojn lanecajn;
la birdoj
aŭdigas inter-branĉe
noton post noto
la tutan partituron
de siaj riĉaj polifonioj
dum la frondoj
aplaŭdas
vizitate de la brizo.
En la tepido
de l' posttagmezo
la printempo kontentigita
sin lulas.



Ángel Arquillos (Hispanio)



Mi certas, ke vi foriros

Mi certas, ke vi foriros
Eĉ malgraŭ mia sufero,
Pro tio mi turmentigos...

De antaŭlonge mi divenis,
Ke temis pri simplaj vortoj,
Kiujn mi tute forgesis.

Vi certigis ĉiam resti,
Sed kiam mi ektuniĝis,
Vi kun moko ekridetis.

Mi certas, ke vi foriros
tra la pordo malantaŭa,
Kiam la tag' malheliĝos.

Moissey Bronshteyn (Rusio)



Nin rekrutis la tempo
por la mond' malmodela.
En benata printempo
ĉiu estis fidela
al aspiroj kaj moroj
de la Verda Ĝarden' kaj
al amikoj fervoraj
en bataloj senvenkaj.

Jes ni strebis kunigi
ĉion, kio necesis...

Ve' —la mondon bonigi
 tamen ni ne sukcesis.
 Eble nun kun malŝato
 diros iu profano,
 ke ni padon post pado
 konkeradis en vano.

Tamen juĝu nun dio,
 pri praveco de l' diro.
 Mia generacio
 saĝe, antaŭ foriro,
 ne reagis al mokoj,
 kalumnioj, kritikoj,
 sed reagis al vokoj
 de sinceraj amikoj.

Por ni gravas, — ho ve! — ke
 ŝrumpas nia ĝardeno.
 Nin elsarkas forbeke
 tempobird'. Sen reveno
 jam foriris en tristo
 al la glora paseo
 Ljonja, Lena, Aristo,
 Olga, Slava, Staseo...

Tiu birdo malica
 ja ne havas preferon —
 eble mi estos vica,
 kiu lasos la Teron.
 Sed fieros kun beno
 mi ĝis la vivofino,
 pri la Verda ĝardeno —
 nia glora destino.

Iam, kiam mi estiĝos
 tute laca, tre kaduka, —
 tiam iam okupiĝos
 nure pri labor' traduka.
 Kiam haroj perdos denson,
 montros grizon surtempian,
 tiam ĉiun fremdan penson
 mi tradukos, kvazaŭ mian.
 La propra opinio
 estingiĝos sinofere,
 kaj degelos mia mio
 eĉ surpapere.

Iam, kiam mi kutimos
 en la plato serĉi fundon,
 volnevole ekestimos
 ŝtelon, flaton, monabundon,
 kiam nur iama gloro
 inercie antaŭkuros,
 mi en iu trista horo
 mian gorĝon, certe, ŝnuros.
 Se donos tian sorton
 mia morna vivovojo —
 mi preferas ĝojan morton
 al la morta ĝojo.

Iam, kiam en izolo
 mornaj pensoj min sieĝos,
 tiam iam mi en folo
 la amikojn forajn preĝos.
 Ia hela rememoro
 tiam tuŝos min ekstaze —
 doloreto, ne doloro,
 kvazaŭ vangon vundis raze.
 Se l' esto jam ne festo,
 nur la griza emocio —
 mia fora hom' favora
 savu min de tio.

Se estus mi drinkulo,
 ĉe l' vid' de plena glas'
 ekprancus mi kaj dancus mi
 pro tia bonokaz'.

Se estus mi lingvulo,
do la akuzativ'
ĝojigus min kaj tentus min
en mia brua viv'.

Se estus mi amulo,
neniu fraŭlinet'
ignorus min, evitus min,
amante en sekret'.

Sed estas mi stultulo
kaj zorgas multe pli,
ke sciu do neniu do
pri plago tiu ĉi.

Klaus Friese (Germanio)




Ĉe marbordo

La mevoj krias laŭte ĉe marbordo.
Muĝas la ondoj, dancas sub la vent'.
Flugas la nuboj haste en akordo,
kovras la sunon foje kun konsent'.

Homoj promenas pace sur la plaĝo.
Nudaj piedoj ĉe la mara rand'.
Pro akraj konkoj gravas la kuraĝo.
Malmolaj ŝtonoj pikas sen demand'.

Malsato nin molestas dum migrado.
Bongusta bulko jen en dekstra man'.
Aŭdiĝas nun terura mokrriado.
Por mevo estas efektiva plan'.

Rapide bulkon ŝtelas ĝi en flugo.
Ne povas fari prirabita hom'.
Nur restas plumo blanka kun lanugo.
Ŝtelisto nun fariĝas la fantom'.



Kial?

Pli kaj pli da homoj havas nun tatuojn.
Strangaj bildoj, ne nur floroj. Kial malbeliĝo
nur?

Ĝi ofendas la okulojn.

Malbelec' min ĝenas. Mi ne ŝatas tion.
Eĉ la muŝo, kiu venas senintence el natur',
estas por mi nur fripon'.

Malfruiĝas buso. Longe mi atendas.
Ĝojo pro la tempa pluso mankas pro la
konsekvenc'.
Kial? Kial? Ĉiu plendas.

Ĝustatempe esti, tio ne plu eblas.
Ĉe haltejo devas resti ĉiu por la rekompenc',
se la buso vere venas.

Sed la suno brilas. Belas la vetero.
Kial vi malmulte miras pro la manko de
problem'?
Ĉiam restas la espero.

Ĉie estas ĝojo. Serĉu ĝin zorgeme,
en la mond' sur ĉiu vojo eĉ en tiu ĉi poem'.
Tial ridu jam matene.

Aer-dinamiko

mia vivo malpli grava
pli malpeza vivado
ĉu malprobabla flugo?
Fiziko senmaskigata
estu revo mia ludo

al fizikaj leĝoj preteratento
same ankaŭ al bonsenco
de flor' al flor' Abel' flugas
vive flugas sur senfin'
ho kaj mi kaj mi kaj mi?

eĉ per flugiloj kurtaj
 certe tamen ne tondataj
 leviĝas ĉi tiu flama korpo
 el fajro al aer' nur salto
 surda al plendoj malsensataj
 malpeza venko ĝis alto.

Rita Mkrťĉjan (Amenio)



Bonan Esperanto-Wagon!

Li havis belan verdan tason,
 Per kiu verdan teon trinkis
 Per la skribilo, ankaŭ verda
 Apud la tablo ion skribis.

Pentraĵo bela apud lito
 Kun vojo verda, verda kampo
 Kaj kiel stel' lumigis ĉambron
 Per verda lumo eta lampo.

Forflugis jaroj, temp' trapasis
 Li rememoris kun tenero
 La tuta viv' ne estis "verda",
 Sed hom' ne vivas sen espero.

Ne estis el alia planedo,
 Ne estis stranga vivekzisto,
 Memorinsignojn verdajn gardas
 Kun "verda" kor' Esperantisto!

Al virtuala amiko

Ni estis tre proksime – en la reto,
 La konatulo, nomo, nur vizaĝ'
 Pri amikec' – propono, peto,
 Komentoj kurtaj kun humur' kaj saĝ'.
 Lakona parolad', ne babilado,
 La vortoj – el profunda sin',
 Honestaj, laŭdaj, dankemaj
 Pri kara al la koro poezi'.
 Ĝis nun la vortoj sonas en oreloj,
 De nomo, de vizaĝo, siluet',
 Nur kurtaj frazoj, varmaj kaj sinceraj
 Kaj en dezerto eĉ aperos la poet'.

Wally du Temple (Kanado)



Urso, Grava Indigena Avataro

Kiam la Polusa Spirito regas
 kaj la glacia vizaĝo de morto surteras,
 Al vi ni petas!
 Ho Grava urs-avataro
 de forto kaj potenco,
 Kiel vi povas travintri
 la frostan vizaĝon
 de trans-morto?
 Oranĝa laktumo de salmo instruas
 Ho Helpa urs-avataro
 de resanigo,
 kiel vi povas utiligi
 la saĝosongon
 de trans-dormo?
 Dorso-frojtoj sur arbotrunkoj memoras
 Ho Silenta urs-avataro
 de spirita saĝo,
 Kiel vi povos atingi
 la agrablan kapablon
 de trans-formo?
 Auskultu al la radikoj de sanktaj arboj

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Esperantistoj

Homoj plenaj je verve kaj espero
 en la mondo kie troviĝas laboro:
 realigi belan revon kun gloro
 por la bono de la homaro.
 Ĉie ili parolas Esperanton,
 komencante kun "saluton!"
 Kiam ili volas skribi poŝtkarton,
 la unua vorto ja estas "saluton!"
 Tra la mondo estas malkompreno;
 por kompreno, tio estas ia veneno.
 Diverseco nia neniam estas puno

por ni, homidaro kun ŝtona koro?
 Homoj kutime ja havas intereson
 kaj bezonon koni alian personon.
 Estas necese havi vastan konon;
 Esperantistoj havas proponon.

Yogyakarta, 7 februaro 2012

Jadranka Miric (Serbio)



Lasta adiaŭo

Akvo torenta
 ĉe riverbordo,
 staris ŝi plorsenta
 kun mano en aero frostita.

Ĉe ŝiaj piedoj, sur mola tero
 longe kuŝis malfermita letero.
 La sciigo pri la amikmorto,
 la sciigo pri lia malbona sorto.

Okuloj plenaj de larmoj
 sur lipoj vortoj amaraj
 mallaŭte flustritaj al karaj :
 “Blasfemita estu tiaj karmoj.”



Staras vi kun decida paŝo
 antaŭ mi. Flirtis mia hararmaŝo.
 Ruĝa bukedo en la manoj
 en la alia sako kun panoj.

Ni komprenas nin okule
 ĉar amo nia kreskis kun ni ,
 por ke ni en ora aŭtun’
 kontente rigardu subiron de la sun’.

Suno kaj vento

Donis sun’ ardan kison al ŝi.
 Urĝe flugis venteto al ĝi
 por pli freŝigi ĝin,
 por ke ne forbrulu mielaj lipoj ,

por ke ne restu vanaj amdeziroj!

Sunsubiro

Bluas ĉielo
 klare kaj pure
 de frumateno
 ĝis fru-vespero.

Antaŭ vespero
 ĉielo oriĝas ,
 ĉar okcidente sun’ subiras
 kaj tuj ruĝe flamiĝas!

Elena Popova (Bulgario)



La mistera luno

Ĝi trinkas de la maro,
 kaj ĉion redonas
 sen avaro.
 Similas ĝi al pilko hela,
 mistere rideta,
 aŭ al arko, rikolti preta.
 Ĝi jen ploras, jen ridas
 kaj atendas ni ĝin fidi.
 Per ŝuoj arĝentaj
 sin ĝi ĉiam vestas
 kaj gaje iam festas.
 Muzikas l’orkestro stela
 por la Luno mistera.

Mara venteto

Varma ventet’ silente
 karesojn serĉas.
 Ĝi odoron sentis
 kaj kaŝan sopiron.
 Neatendante
 la ondoj ridante,
 gaje ekkantis
 al ventet’ ŝatata
 kaj ĝin ekluletis
 en blua boato.
 –Feliĉa fortuno!... –

sopiris la dunoj.

Someraĵaj emocioj

Mara vastaĵo.

Zefir' – vent' subskribinta
pacon kun si mem.

Sablo – plorado
de la rokoj. La akva
spirito ludas.

Larmoj pro dolor'
en la perla mitulo –
naskiĝas belec'.

De la ĉiela
akvofalo – somera
konsolo – perloj.

Kant' de alaŭdoj.
Aromo de grenspiko.
Rikoltsezono.

Iuj en jahtoj,
iuj kolektas grenon.
Kosma pesilo.

Mara resonado
en orelo de konko.
Kisoj de ondoj.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Senhejma luno
aperis super l' arbar'.
Birdoj raviĝas.

Belaj hirundoj
Sur la telegrafdratoj.
Koncert' por birdoj.

Morna sunsubir'
travagas tra montetojn.
Serĉas la lunon.

Stela noktomez'.
Vaganta senhejma lun'.
Saksofono ĝemas.

Krepuskvespero.
Paŝoj sur trotuaro.
Solemul' tremas.

La urĝa tago.
Odoro de siringo.
Somero venos.

Sur la teraso
nudpieda kokcinel'
Vent' karesas ĝin.

Printempa vent'
en animo de Eva—
Amajn flugilojn.

La nokto falis.
En la ĉambro reĝadas
tango de pasi'.

Kantas la klavoj
en siringaj belnoktoj.
Amo jam venis.



Bohdana Jehorova

Estis vi ĉi tie

(kantteksto)

La animon postrestas nek larmoj nek ĝemoj—
anstataŭe nur estas angoraj poemoj,
kaj anstataŭ malĝojo – lacec' iometa...
Jen ĝi estas pasia, jen estas kvieta...

La animo graviton neniam suferas,
ĝi ja estas senpeza, kaj ĝi superteras.

ne influas ĝin teraj reguloj kaj celoj,
siaj propraj inspiras ĝin revoj kaj veloj...

Kaj se volos ŝi morti pro sia soleco,
kraŝi pluvosimile surteren senkrie –
rememoros certe ŝi: estis vi iam ĉi tie...
rememoros certe ŝi: estis vi ĉi tie...

Volodimir Dankeviĉ

Vin invitas al si Kolomeo

(kantteksto)

Primavere bonvenu al ni,
Kiam floras ĉe ni kastaneoj,
Kiam sonas ĉe Prut' melodi',
Vin invitas al si Kolomeo!

Eble loĝas feliĉ' tie ĉi,
Logos vin ĉarmulin' en fabelon,
Kiam fluas vesper' en juli',
Kovras alpa arom' Kolomeon.

Eĉ en foraj ravaj mondoj
En memoro bluos montoj,
Kor' sopiros al paseo,
Kolomeo, Kolomeo!..

En aŭtuno bonvenu al ni,
Partoprenu kun ĝoj' gajan balon,
Dancu fajre en arda pasi',
Kiam ludos kun ŝalmoj timbalo.

Se timigos vin vintra vizi',
Kiam frosto brakumas piceon
Kaj surmontas nur neĝ' kaj glaci',
Vin varmigis per kor' Kolomeo.

Eĉ en foraj ravaj mondoj
En memoro bluos montoj,
Kor' sopiros al paseo,
Kolomeo, Kolomeo!..



Andrij Maliŝko

Kara mia patrino

(kantteksto)

Kara mia patrin', vi ne dormis sufiĉe,
Al la rand' de l' vilaĝ' akompanis vi min,
Kaj por voj' malproksima kun deziroj de
sorto feliĉa

Mi ruŝnikon broditan ricevis de vi.

Kaj por voj' malproksima kun deziroj de
sorto feliĉa

Mi ruŝnikon broditan ricevis aŭrore de vi.

Floru sur la ruŝnik' rosoplenu vojeto,
Niaj verda herbej', najtingal', arbaret',
Via, kara patrino, karesema fidela rideto,
Viaj bluaj okuloj kun trista kviet',

Via, kara patrino, karesema fidela rideto,
Viaj bluaj okuloj kun trista tenera kviet'.

La ruŝnikon dum viv' sternos mi kvazaŭ
sorton

En herbara susur', en kverkara fascin'.

Kaj sur tiu ruŝniko reviviĝos por ĉiam sen
morto:

Infaneco, disiĝo kaj am' de patrin'.

Kaj sur tiu ruŝniko reviviĝos por ĉiam sen
morto:

Infaneco, disiĝo kaj amo de mia patrin'.



Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Rideto dolĉa

Dolĉa bonodoro!
Tiel dolĉas via belrideto,
kiel la pompanta floro
en printempa mildventeto!

Kie vidis mi vin vere?
La rideto estas tiel bonkonata,
mi ne povas ĝin memori elapere
nun en ĉi momento plata.

Ho ja, en la sonĝo bela,
sonĝe vidi mi vin devis!
Tiel dolĉe vi ridetis hela,
estas vi, mi kiun revis!

— Esperantigis *Yi Qiao* surbaze de la ĉina amkanto de *Zhuang Nu* (kantlirikisto) kaj *Teresa Teng* (popkantistino).

Kanto pri enterigo de floroj

Floroj velkis, jen flugas tra tuta ĉielo,
kiu svenantan aroman belruĝon kompatas?
Stamenoj flirtas super printempa kastelo,
falantaj amentoj leĝere kurtenon enbatas.

Tricent sesdek tagoj de la jaro,
akra vento, frida frosto pele ofensivas.
Brila belo, freŝa ĉarmo ŝrumpos en amaro,
malfacile trovitaj, tuj kiam ili drivas.

Florado videblas, sed ne plu dum velkinte
forpase,
mornas flor-enteriganto antaŭ ŝtuparo kun
murmuro,
sole kun la floro-ŝpato verŝas larmojn kaŝe,
sur la nudaj branĉoj estas makulita
sangospuro.

Espereble flugus mi kun flugiloj de
oportuno,
sekvante florojn al la fino de ĉielo.
Je la fino de ĉielo,

kie troviĝus parfuma duno?

Prefere via stumpo konserviĝas en
brokato-sako,
manpleno da pura tero ŝirmas romantikon la
maturan.
La virto venis ĉasta kaj restas pura ĝis lasta
tago,
pli bone ol koto sinkinta en defluejon
malpuran.

Vi nun estas trivita kaj mi enterigas vin,
sed mi ne povas diveni la tagon de morto
mia.
Nun pro enterigo de floroj, oni mokas min,
sed kiu povos enterigi min en jaro la alia?

Tuj kiam printempo finiĝas kaj floroj falas,
estos tempo, ke la belulino jam forpasas
svene.

Kiam la printempo kaj la belulino kaduke
fatalas,
kiu ankoraŭ atentos pri l' forfalintoj ĉagrene?
— Esperantigis *Yi Qiao* surbaze de la konata poemo
el la ĉinlingva majstroverko "Sonĝo de Buduaro"
de *Cao Xueqin* (1715 - 1763). Komponisto: *Wang Liping*;
Kantistino: *Chen Li*.

Tradukis



Yi Qiao (ĉino en Germanio)

Vullnet Mato



La virinaj dubeloj

La virinaj dubeloj, maldikaj kudriloj,
Brodas la teron, kie ajn ili piedpremas
Sed la junulinaj maldik-taliaj dubeloj,
Plurestas en la junulaj okuloj.

La altaj dubeloj, sub la virinaj piedoj,
Ĉampanaj boteloj por reklamado.

La ĉarmo de la dubeloj, igas ilin sklavinoj,
Sed la viroj amas ilin ĝis la sklavecigo.

La virinaj dubeloj, tik-tako de la horloĝo,
Nombras la sekundojn tie, ĉi tie,
Moviĝas ili kvazaŭ hormontriloj, tuttempe,
Sed al la viroj ili paŝas en la cerbo.

La virinaj dubeloj, dumvoje al la bebo,
Elgutas mamlakton, gutgute,
La mamoj elŝiras al viroj la cerbon disde la
kapo
Ili apenaŭ atendas, por ĝin iom karesi.

La virinaj dubeloj, korbatoj,
Ilian ritmon la amo reguligas
Ili al viroj incitas singultojn,
Sed la ties trak-truko pulsas en la koroj.

La virina dubeloj, longigitaj ĝis la plando,
Igas ilin aglinoj kun surteraj flugiloj.
Iliaj flugiloj, kuras sub la robo,
Sed la viroj sub la robo, preĝas perkape...

Alma Jaku



Mi jam diris, karulo mia

Jam mi diris al vi, karulo,
Ke la ĉielo en la mia vilaĝo,
Estas granda,
La steloj ĉe la pordo
Kiam vi kisos min
Ekbrilos senvorte.

Ah! Al Luno...
Nur al la luno...
Mi timas
Kiu descendas sur la tero.

Mi timas
Por kisi vin,
Nostalgie!...

Leonid Turkadze

Festu novjaron

La DuDek Tria alvenanta
Nin estas strange surprizanta.

Jam multajn milojn da Novjaroj
Ni post Decembro ĉiam festas
Kaj ne supozas, ke eraroj
En la surteraj kalendaroj,
Nin konfuzante, trompĉeestas.

Por esti iom pli konciza, –
Jen misinformo tre surpriza:
Septembro – SEP, sepa numero.
Kaj 9 estas ja malvero!

Oktobro – OKTO! Vi komprenas!
Ĉu tio vin plu ne ĉagrenas?
NOVembro kaj DECembro, –
respektive
Sonas absurde, false kaj naïve.

Ĉu tio estis ŝerca ŝanĝo
De kronikistoj-romianoj?
Aŭ la ordono por aranĝo
De la Potenc-eklezianoj?

Neniu scias, kiu prenis,
Ĉu grekoj aŭ la olda Sparto.
Novjaron IAM ni solenis
Tutmonde en komenc“ de Marto!

Laŭ hipotez“ astronomia,
Ni estas Ter-Alvenantaro.
Kaj praantikva kalendaro
Atestas nun pri fakto tia.

Malgraŭ io, hej, homaro!
Estu feliĉaj en Novjaro!

Elalbaniigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Jiang Kui (1155-1226)

—laŭ melodio *Ĉarma kantistino*

Per ŝipo mi veturas kun plezuro
inter fajrruĝajn lotusflorojn en
veget-konkuro.
Pli frue kiam tien ĉi mi venis por spektado,
mi ĉiam ludis kun ambirdoj en akv-vado.
En la vidkampo lotus-lagoj tridek ses
ligiĝas tute kiel vasta spac' sen homa agres'.
En vento lotusfloroj jen svingiĝas kun
kapklino
kvazaŭ en rob' kun jada zono la belino.
Zefiro blovas tra lotusfoliojn de smeraldo
kun floroj kiel ruĝo sur pudrita vang' pro
ebri-ardo.
Kiam strietoj pluvaj lemnojn frapas jen
pasie,
similas ili al dancantaj belulinoj bel-gracie.
Aromo el lotusoj tuje ŝvebas sur papero,
fariĝas versoj elde mia plumo kun libero.

La suno tuj subiros ĉe vespero,
sed l' amatin', ankoraŭ venas ne por kvero.
Folioj larĝaj kaj junverdaj staras baldakene,
do, kiel ili povus sveni disen ĝene?
Mi timas nur, ke l' vento furiozos blove,
kaj ruĝ' kaj verdo ruiniĝos pro, ve,
la kirliĝantaj ondoj en la lago
kaj la lagbord' fuŝitas pro vent-plago.
Disiĝo nia min ĉagrenas tre,
kiam ekpensas mi pri l' ide'.
El altaj salikarboj pendas jen malalte
vergetoj longaj, fiŝoj folas salte,
kvazaŭ retenus ili min al floraro.
Lotusfolioj rondaj min tre tiklas,
ke mi ne volas min deŝiri de la lotusmaro.



Yu Guobao (?-?)

—laŭ melodio *Vento inter pinoj*

Mi elspezas multan monon
por aĉeti florojn primavere,
kaj ĉe l' lago ĉiutage
drinkas vinon jen libere.
La ĉevalo blanka, kiun rajdas
mi, jam l' apudlagan vojon konas
kaj henante kun levita kapo
preter vinvendejojn ja imponas.
Bonodor' de abrikotoj ŝvebas
en muzik' de fluto kaj tamburo,
En la ombro de salikoj verdaj
oni svingas la pendolon kun plezuro.

Sur la pad' ĉe Okcidenta Lago
amasiĝas belulinoj sub sunlumo.
Ilia kapo ŝarĝitas per ornamoj
sovaĝfloraj en la harbrakumo.
La boato veturigas min kaj printempon
al la hejmo laŭ la fluo.
Mi nur lasas la restantan bonhumoron
al la akvo en nebula pala bluo.
Morgaŭ mi revenos al lagbordo
kun ebri' restanta el l' antaŭa tago
kaj apezos belulinojn ĝojludantaj
sur la bordo de la lago.

Dai Fugu (1167-?)

TURO YUEYANG

—laŭ melodio *Verdas salikpintoj*

Kun spado en maniko
sur Turon Yueyang mi ascendas.
Prosperas verdaj herboj ĉe la Dongting-lago
kaj l' akvo en aŭtuno brile sin etendas.
Spektante ondan akvon jen sur Turo
Yueyang,
mi montras mian bruston jen ĝojplene.
Necesas ne kunporti vinon al la turo,
nu, kiu povus drinki kun mi ja senĝene?
Hommondo jam ŝanĝiĝis multe,

sed la monteto Junshan en la lago
neniel aliigās iomete de l' antikv' ĝis nun,
starante en la akvo kiel sago.

Elĉinigis



Veĵdo (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK-TRIA

Sub la ĉielo

§33-02

La ekscesa lukso, la malŝparo kaj la tro imponaj ritoj devas esti evitataj, kaj la diversaj striktaj reguloj kaj severaj disciplinoj devas esti observataj por kontentigi la urgajn sociajn bezonojn. Ĉiuj ĉi tiuj rilatoj estas entenataj en la antikva taŭismo, al kiu Mo Di kaj Qin Guli alkroĉiĝis. Ili dediĉis sin al la praktikado de la antikva taŭismo. Sed ilia rekomendo kaj ilia praktikado estis tro radikalaj kaj iliaj limigoj kaj malpermesoj estis tro rigidaj kaj striktaj. Ili skribis kontraŭ la muziko sub la preteksto “ŝparado”, kaj levis la principon “neniaj kantoj en la vivo kaj neniam luksaj funebraĵoj post la morto.” Mozi rekomendis “universalan amon” kaj “reciprokan profitigon” kaj kondamnis la militon. Lia doktrino estas kontraŭ la kolero, nome kontraŭ la perforto. Mozi amis studadon kaj estis erudicia. Li ne iniciatis kontraŭkutiman novaĵon, sed li neniam akordiĝis kun la antikvaj reĝoj. Li kontraŭstaris la antikvajn ritan kaj muzikan sistemojn.

La Flava Imperiestro havis sian muzikon *Xianchi* dum sia regado; la reĝo Yao havis sian *Dazhang*; la reĝo Shun havis

sian *Dashao*; la reĝo Yu havis sian *Daxia*; la reĝo Tang havis sian *Dahuo*; la reĝo Wen de Zhou havis sian *Biyong*; la reĝo Wu kaj lia frato Zhou Gong komponis sian *Wu*.

En la antikveco la funebraĵoj estis klasitaj laŭ la socia rango de la mortintoj. La ĉerko por la reĝo konsistis el sep kestoj de diversa grandeco; por la dukoj, el kvin kestoj; por la granda oficisto, el tri kestoj; por la malsuperaj oficistoj, el du kestoj. Sed nun nur la moistoj persistas ĉe la principo “neniaj kantoj en la vivo kaj neniam luksaj funebraĵoj post la morto” kaj rekomendas, ke la ĉerko konsistu el unu sola kesto el tabuloj dika nur je tri *cun*-oj, kaj ke tio fariĝu fiksita regulo sekvena.

Eduki la popolon per tia principo certe ne estas la vera amo al la popolo. Devigi sin observi la regulon kompreneble ne estas la vera amo al si mem. Mi ne intencas tute senvalorigi la moisman doktrinon, kiu sendube havas sian propran pravecon. Kaj tamen, la repuŝo de la emocioj ja estas kontraŭ la homa naturo: t.e. sin deteni de kantado eĉ tiam, kiam la okazo tion postulas; sin deteni de ploro eĉ tiam, kiam malĝojego estas elvokita; kaj neniam muzikaĵo ludata eĉ en okazo de bezono. Ĉu ĉio ĉi estas konforma al la humana sento? Tamen laŭ la moistoj la homo devas labori diligente dum la vivo kaj esti enterigita en simpla maniero post la morto. Kiel severa estas la moismo! Estas neeble sekvi tiun ĉi doktrinon, ĉar ĝi, ne povante esti rigardata kiel konforma al la Taŭo de la ĉielo, alportus al la popolo maltrankvilon kaj malĝojon. Ĝi estas kontraŭ la deziroj de la ordinaraj popoloj kaj sekve estas nek akceptita, nek tolerata de ili. Kvankam Mozi mem povis ĝin sekvi, tamen la ordinaraj popoloj tute ne scias, kion ili devus fari rilate ĝin. Tiele li restigis sin eĉ pli malproksime de la deziroj de la popolo, por ne paroli pri la deziroj de la antikvaj reĝoj.

Mozi laŭde diris: “Dum sia regado la reĝo Yu penis jungi la inundon per reguligado de la riveroj de la tuta lando. Li faris la riverojn interligitaj kaj kondukis ilian akvon senbare al la maroj. Rezulte de tio, li dragis 300 grandajn riverojn kaj 3000 alfluantojn kun sennombraj riveretoj. Li persone laboris tenante la fosilon aŭ portante la korbon por forigi la ŝlimon, kaj fine deturnis la inundon en la ĉefajn riverojn. Laborante li ŝparis neniam siajn fortojn kaj iradis de loko al loko, tiel ke liaj kruroj senkarniĝis kaj la haretoj sur ili estis tute defrotitaj. La reĝo Yu estis granda saĝulo, kaj tamen li tiel penegis laboris por la bono de la ordinara popolo.” Per tiuj vortoj Mozi volis, ke liaj postaj disĉiploj portu vestojn el kapra felo kaj kruda ŝtofo kaj ŝuojn aŭ sandalojn el ligno aŭ pajlo; ke ili pene laboru tage kaj nokte kaj vivu simplan vivon, prenante tian sinhardadon kiel sian idealan vivmanieron. “Se ni ne disciplinus nin en tia maniero,” ili diris, “niaj agoj ne konformus al la doktrino de la reĝo Yu kaj sekve ni ne indus esti moistoj.”

La postaj moistoj, kiel Xiangli Qin kaj la sekvantoj Wu Hou, Ruo Huo, Yi Chi kaj Deng Lingzi el la Sudo, ĉiuj kondukis diversmaniere kontraŭ la moismo, kvankam ili ĉiuj recitis la libron *Klasikaĵo de Moismo*. Ili akuzis unu la alian pri la herezeco kontraŭ la moismo. Ili disputis pri tiaj vaste konataj temoj kiel ekzemple “la rilato inter la malmoleco kaj la blankeco de roko”, “la rilato inter la similecoj kaj la diferencoj de objektoj”, por akuzi kaj kalumnii unu la alian, kaj uzis tiajn lertajn esprimojn kiel “neparaj nombroj kaj paraj nombroj neniel povas esti la samaj” por refuti unu al la alia. Ili inklinis rigardi la ĉefon de sia sekto kiel saĝulon kaj respektis lin kiel majstron, esperante, ke iam li fariĝos la ĉefgvidanto de la tuta moisma skolo; kaj plie, ĝis niaj tagoj tiuj disputoj ankoraŭ ne trovis la solvon.

El la supre dirita oni povas konkludi, ke bona estis la intenco de Mo Di kaj Qin Guli, sed ilia praktikado meritis nenian komplimenton. La ekzemploj, kiujn ili starigis, misgvidis la postajn moistojn, ke ili sin lacigis nur por senkarnigi siajn kruroj kaj forfroti la haretojn sur ili, kaj konkuris per tio inter si. La moisma doktrino povis servi kiel la plej efika rimedo rebonigi la mondon en la malorda tempo, sed, por la regado en la tempo de paco kaj prospero, ĝi tamen estis rimedo la plej nedezirata. Malgraŭe, Mozi ja vere amis la popolon kaj persistis ĉe sia celo eĉ neatingebla. Kvankam li elĉerpiĝis kaj malgrasiĝis tiel, kiel sekiĝinta arbobranĉo, tamen li rifuzis rezigni sian doktrinon. Kia noblanima klerulo!

Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (Ĉino en Germanio)

Nostalgio

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu**

La luno jen tenere
klaras vespere.
Sopiras kare al vi,
mi suspirante kun nostalgi’.

Delonge ni apartas,
kiel vi fartas?
Mia kora bondezir’
vin benas kun amika aspir’.

**Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; /*

7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Pilgrimado

— laŭ ĉinesko *Rivero plenruĝa**

Tra la templo
jen flosas
leĝervento.
Mi pie
trapaŝadas
kun kultsento.
Buntpeonioj pompas
impone en prezento.
L' etoso
inspiras min de
kontento.

Sublima
silento
plenas de
sankttento.
Dum pilgrimado
kun prudento
mi preĝas pri favoro
de l' dia firmamento.
Por ĉiam
restu glora ĉi

**Rivero plenruĝa* (ĉine: *manjianghong*): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo *xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa* (*x = senrima*)

Jadranka Miric (Serbio)

Someraj pensoj

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Venteto
tutage blovis
milde. De tempo al temp'
grizaj nuboj aperis.
Tamen sun' venkis.

Delonge

mi ne vidis la
estaĵojn kiel estas
lampiroj! Korpet' luma
kaj ege ĉarma.

Somere
nostalgie mi
memoras infanecon.
Ĉu ankaŭ pensas pri mi
Vi, karega, ci?

De tempo
al temp' songas mi
hejmlokon de infanec'.
Restos por ĉiam nur vi
kaj senzorgaj ni!

Infanec'
feliĉa postaj
malsukcesoj mildigas.
Estas en mondo multaj
pruvoj ĉi tiaj.

**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

Laimundas Abromas (Litovio)



Necesas ion fari

Kutime geesperantistoj estas bonaj homoj. Ili estus eĉ pli bonaj, se ne tiu vivo. Ĝi kondukas la homon al tento. Nur ne atentis li, ŝi, oni vidu, ili jam iras misvojon, jam kotvadas en la marĉo. Kaj poste la rezulto montriĝas. Mi komprenas, ke esperantistoj estas bonaj, sed malfortaj anime. Malgraŭ ĉio, ne mi decida, ne mi juĝu. Mi nur konsolas min. Ĉu vi komprenas, kion mi volas diri? Kiaj ni estas, kiam ni hipokritas, kiam ni ŝajnigas, ke ni estas ne tiaj, kiaj estas vere? Sed kiaj estas ni? Tamen pro ĉio ni kulpas mem.

Ĉu ni ne tro multe permesas al niaj gvidantoj?!...Ĉu ni ne portas sur niaj dorsoj diversajn, mi pardonpetas...? Ĉu estas ni, kvazaŭ blinduloj sur la pentraĵo de Pieter Bruegel, kiuj permesas al blindaj gvidantoj nin konduki? Kaj poste ni krias, ke oni nin trompis. Tamen ni ne estas blindaj. Ne estas ni blindaj, nur fojfoje, portempe ni fermas niajn okulojn, ne rimarkas ion. Kaj poste ni krias: „UEA gvidantoj spertas krizon pri identeco. Nuna UEA havas grandajn organizajn problemojn, mankon de efika strategio kaj kunordiga agado. Ĝi komplete perdis orientiĝon. UEA drivas, mankas aktiveco en la Komitato, oni forvendas la ĉefan sidejon!...“ Tia estas la vivo!... Kaj ni estas ĝiaj ostaĝoj, ni estas malliberuloj senrajtaj. Karaj gesamideanoj! Se vi sentas vin, kiel senrajtaj malliberuloj en la esperantista movado, tiam ni ion faru.

„Kie estas Ivo Lapenna, la dua, kiam UEA misvojas, disŝiriĝas? Kiam ĝiaj gvidantoj amatoras kaj kaŝas sin de esperantista popolo.“ Tio estas la demando de esperantistoj veteranoj, aktivuloj. La respondon ili ne donas. Tiaj demandoj nomiĝas retorikaj. Tiun demandon malfacile oni respondas, tamen veterano Simeono tutegale ektremas. Li sentas sin respondeca kaj kulpa. Vere – kie estas Ivo la dua? La demandinto povus iĝi tiu la dua, sed, verŝajne, li okupiĝas pri aliaj aferoj. Simeono povus iĝi tiu la dua, tamen ĉimomente li ĝisorele estas inundita de personaj aferoj, dume li ne povas forlasi ilin. Simeono cerbumas, pensas, ĉirkaŭpreninte per manplatoj la kapon kaj per kubutoj apogante sin sur la tablo.

En alia flanko de la tablo sidas Mikaelo, ankaŭ veterano. Li ankaŭ cerbumas. Ili estas optimistoj denaske kaj praktikuloj ĝisoste.

—La duan Ivo Lapenna ni, eble, trovos, — cerbumas Simeono, —tamen kie trovi verajn

geesperantistojn, kiuj al li kredu kaj obeu lin? Jen kia demando..!

—Necesas ion fari, —diras Mikaelo, levigante la senkulpajn okulojn, — necesas ion fari.

— Necesas ion fari... — konsentas Simeono. — Ni devas vivi, dum vivas kontraŭuloj de Esperanto. Kaj ni neniam dormetu, dum mankas ili. Ni estu prudentaj. Ni estu pli bonaj kaj pli saĝaj. Ni ne permesu al ili trompi nin.

Ili ankoraŭ iomete cerbumas. Ili deziras malbeni la sorton. La sorton kaj ĉiujn figvidantojn, kiuj diktas regulojn, elpensas diversajn stultaĵojn, aŭ entute nenion faras.

—Necesas ion fari, — denove diras Mikaelo. Tio estas kiel savsignalo „necesas ion fari“ tiumomente, kiam vi mem sidas sur la sablobenko kaj drivas. Malfacilas tion akcepti.

— Necesas ion fari, nome kion? Diabolo prenu! , — ripetas Simeono. — Kion fari? Ion!

Tio nervozigas ilin. Ŝajne ili devas scii, devas respondi. Aliflanke la konscienco povas ilin turmenti, riproĉi ĝismorte. Tio ofendas iliajn personan honoron kaj dignon.

—Necesas ion fari... — ripetas Mikaelo. — Ĉefe, ne perfidi! Neniam kaj neniukaze. La vorto „perfido“ estu por ni mortiga. Do, kion fari?

—Vi sentu vin kiel mondĉivitano, — rekomendas Simeono.

Mikaelo ekĝojis, sereniĝis.

—Ĉu vi diras?! Ŝajnas, ke via ideo ne malbonas.... Tamen kien vi turnas? —demandas Mikaelo. — Denove „Esperantistoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!“ Sufiĉas por ni tiuj revolucioj! Ni havu paciencon. Ne ĉion samtempe...

—Mikaelo por momento eksilentis kaj ekpensis. — Jes, ni sentu nin kiel mondĉivitanoj, ĝis ni alĉutimiĝos. Interese,

kiel sentas sin tiuj mondcivitanoj? Interese, kion similas ili?

—Pro kio ni ŝanĝiĝis? Kiam ni maturiĝis? Pro kio, —parolas Simeono. —Pro kio ni ridetas, kvazaŭ en farunon fekintaj? Pro tio, ke ni kakis? Pro kio?

Ili ploras, jes, ploras... Ili tre kompatas tiun UEA, ĉar ili vidas katastrofon.

—Perdiĝos tiuj geesperantistoj en la vivo, perdiĝos ili ... poreterne, — bedaŭras Mikaelo. — Ŝajnas al mi, ke neniu serioza esperantisto, sincere laboranta por Esperanto, povas subteni kaj aprobi tian agadon de la gvidantoj de UEA. La afero ne simplas.

Ili cerbumas— „Kio okazas? Kio okazas al esperantistoj kaj la mondo?“ Kortuŝis ilin tiu afero, incitis nervojn.

—Tio estas la komploto kontraŭ sana evoluo de Esperanto. Tio estas la salto de spirita mondo al la tero de fantomoj, — parolas Mikaelo. —Ĉu ne? Min oni facile ne trompos! Delonge mi aŭdis, kia estas mizera, fia la mondo.

—Jes, vi pravas, Mikaelo. La estraro, sub la gvido de fiulaj gvidantoj kun subteno de la komitato, perfidis la movadon, — konsentis Simeono. —Tamen, malgraŭ ĉio, necesas ion fari.

—Se ankoraŭ io mirigas min, do nur tio, ke mi jam ne plu miras entute. Aliflanke nenio mirigas, ke mi perdis la senton miri. —eldiras sian opinion Simeono. — Ĉar ni vivas en la tempo, kiam nenio neniu mirigas... Pro tio ege strangas, ke ankoraŭ troviĝas tiuj stranguloj, kiuj ĉiam ion elpensas.

—Nu, jes, vi pravas. La perdoj multas, tamen atingoj — dubindas. — konsentas Mikaelo. —Ne sufiĉas vendi Esperantajn librojn, ili ekvolis vendi la centran sidejon de UEA. Mi komprenas, — ĉiuj volas monon. Mi ankaŭ.

— Al mi ŝajnas, ke gvidantoj de UEA estas malsaĝuloj, ĉar ili ne komprenas, kion ili

posedas, — parolas Simeono — Mi neniam komprenis la decidon, kiu estas, laŭ mi, unu el la plej detruaj paŝoj en la historio de Esperanto, kiu venas deinterne de Esperanto movado. Al mi ŝajnas, ke tio estas la mendo de la kontraŭuloj de Esperanto, de angleparolantoj, por frakasi Esperantomovadon. Laŭ ordono de la Sekreta Servo, por ke Esperanto ne kontraŭstaru al la superrego de la angla.

— Brave! — ĝojkriis Mikaelo. — Vi bone, trafe diris! Tiuj gvidantoj de UEA ne estas ekzemplo al ni, ne estas modelo por ni. Ni devas iri nian vojon, ni fosu nian sulkon... La ordo devas esti! — li firme diris, batis per la pugno la tablon kaj apenaŭ ne falis mem de sur la seĝo. La konkludoj aperas spontane, kvankam la afero ne simplas. Kaj Mikaelo pripensis teruran planon.

— Necesas kapti tiujn UEA-gvidantojn kaj bati ilin.

— Sed kiel vi kaptos ilin, ĉar ili kaŝas sin, ili ne interrilatas kun esperantista popolo, — ekdubis veterano Simeono.

— Ni aliĝu a Universala Kongreso. Ili certe tien venos. Ni kaptu ilin tie, piedbatu iliajn sidvangojn kaj forpelu ilin de sur la podio, por ke vidu tutmonda esperantista publiko. Ni ne plu aŭskultos iliajn trompajn paroladojn. Ni forpelu ilin el Esperantujo. Estos nia venko, vera festo por esperantista popolo, — entuziasme parolis Mikaelo. Li iomete laciĝis kaj eksilentis.

— Do, ni rapidu aliĝi al Universala Kongreso, ni ne atendu la lastan tagon, — konsentis Simeono, kapjesis li kaj tuj aliĝis al UKE.

Vi, estimata leganto, ankaŭ aliĝu al UKE, por ne preterlasi interesan spektaklon. Mikaelo kaj Simeono vin atendos tie. Ĝis revido!



